Nu, *Fernández de Lugo*, kiu partoprenis la konkeron de *Gran Canaria* (1478-1483) ricevis, en la disdivido de la insulo, rican terpecon kaj tuj li starigis kanmuelejojn, t.e. sukerfabrikon. Tiam li paktis kun la hispanaj gereĝoj la konkeron de *La Palma* kaj *Tenerife*, intencante starigi pliajn kanmuelejojn en ili. Tiu konkero finiĝis en 1496 kaj la sukerkana kulturado en la Kanariaj Insuloj kaj la posta sukerigo vere montriĝis riĉiga industrio. Nu, ĉirkaŭ 1550, apeŭ 50 jarojn post la konkero, estis 12 kanmuelejoj en *Gran Canaria*, 4 en *La Palma*, 10 en *Tenerife* kaj 4 en *La Gomera*. Ĉe la fino de la XVI-a jarcento — la XVI-a estis la florepoko de la kanaria sukerproduktado —, la stato estis: *Gran Canaria*, 8 kanmuelejoj; *Tenerife*, 10; *La Gomera*, 2; *La Palma*, 12. Jus deĉifritaj tiuepokaj dokumentoj informas nin ke 3 kanmuelejoj de *La Orotova* (*Tenerife*), produktis en 1509 20.000 a da sukero (1 a = 11,5 kilogramoj).

De *Kanarioj* la sukerkana kulturo transiris Amerikon. Sed jam en la XVI-a jarcento, la maŭroj de *Agadiro* kaj

manoj la famajn kanmuelejojn de *Argual* kaj *Tazacorte*, en la insulo *La Palma*. Tiu fama flandro, kies idaro ĝis nun ludis gravan rolon en la insulara societo, estis kurioza homo: pri li ni parolu iom pli detale.

Temas pri la kolonjano *Jacob Groenenborch*, kiu fariĝis antverpenano, ŝanĝis sian nomon je *Jacob van Groenenberghe* kaj edzinigis nobelan flandrinojn, *Margaritan Pruss* (aŭ *Pyms*). Ĉirkaŭ 1510 li vojaĝis al *Kanarioj* kaj sin dediĉis al la sukerkana kulturo. Ekde de sia alveno en la insuloj, li ŝanĝis sian nomon je la responda hispanlingva *Jacome de Monteverde*. Kiel multaj aliaj, inter ili la ankaŭ fama flandro *Aventrott*, kiun akre persekutis la inkvizicio, *Monteverde* ne multe cerbumis pri siaj religiaj devoj. Tial la kanaria inkvizicio procesis lin, pro kio li mortis en la inkvizicia karcero de *Sevilla* (Hispanujo), en 1531.

Kelkaj el la filoj de *Monteverde*, unuj naskitaj en Flandrujo kaj aliaj en *Kanarioj*, poste edzinigis flandrajn virinojn, ekz. *Maria von Masservas* kaj *Maria Van Dalle*. Kio kaŭzis ke la riĉa flandra komercisto *Pablo Van Dalle*, sinjoro de *Lilloot* kaj *Zuittland*, interesiĝis pri la insularaj merkatoj kaj kelkaj el liaj familianoj vizitis la insulojn, kie ili restis. Unu el la filinoj de *Monteverde* edzigis la flandron *Goat Steré*, kiu same restis en la insularo. La filoj de *Monteverde* ricevis multajn honorojn de *Karolo la V-a* kaj *Filipo la II-a* kaj okupis gravajn postenojn en la insulara administracio. Unu el la plej famaj estis *Juan de Monteverde*, kiu estis supera militĉefo de la insulo *La Palma*, kiam en 1553 la franca pirato *François Le Clercq*, *Jambe de Bois* (Lignokrurulo) atakis ĝin. Li ŝajne ne estis bona militĉefo; *Jacques de Sores*, vicĉefo de *Lignokrurulo*, kaperis plurajn anojn el la plej riĉaj familioj de la insulo *La Palma*, inter kiuj *Dona Maria de Estopinán*, edzino de *Juan de Monteverde*. La elaceto de la edzino kostis al li 5.000 dukatojn. Sed tio ne malhelpis, ke la *Monteverde*-idaro daŭre gvidis la superajn postenojn de la insulara administracio.

Ankaŭ la antikva flandra familio *Van de Walle* instaligis sur la insuloj, sed iom post *Monteverde*. La reĝo *Filipo la IV-a* donis al iuj el ĝiaj anoj nobeltitolojn, kiuj restis ĝis hodiaŭ. Inter ili, plej fama estas la *Guisla*-markizitolo, kiun ricevis en la XVIII-a jarcento *Don Luis van de Walle y Llerena*, filo de *Don Luis van de Walle y Urtusustegui*. La familio *Van de Walle* ludis gravan rolon en la societa vivo de *La Palma* kaj *Gran Canaria*.

Ĝis hodiaŭ vivis ankaŭ aliaj flandraj familiaj nomoj, kiaj *Van Damma*, *Van Guemert*, ktp., facile rekoneblaj. Sed certe estas multaj aliaj, kiuj same kiel *Monteverde*, hispanigis sian nomon, post kio forgesiĝis ilia flandra deveno.

Flandroj venis al *Kanarioj* kiel sinjoroj, kiel koloniistoj, por ekspluati la naskiĝantan sukerkanan industrian. La pezan kaj krudan kampanon kaj kanmuelejan laboron plenumis sklavoj, kiujn la koloniistoj venigis en la insularon el la blanka kaj nigra Afrikoj, t.e. el maŭraj aŭ negraj teritorioj. Ĉar la sukerkana industrio postulis, interalie, multekostan manlaboron. Escepte de kelkaj teknikaj pritraktoj, tiu laboro ne postulas kvalifitajn laboristojn. Dungi por ĝi — ja ege peniga kaj kruda laboro — liberajn laboristojn tro altigus la sukerprezon. Tial oni sin helpis «*akirante*» sklavojn: la afrika marbordo ja proksimas al la insuloj. Sekve oni ĉaskapte invadis ĝin: negroj kaj maŭroj iĝis la viktimoj. Laŭleĝe oni ne rajtis sklavigi kristanojn — tiam kaj tie nur katolikojn. Sed negrojn kaj maŭrojn, jes: ili ja estis idoloj, nekredantoj! Tial, *Kanarioj* iĝis apogpunkto por laŭleĝa — kaj ankaŭ kontraŭleĝa — sklava merkato. Angloj kaj italoj estis la ĉefaj sklavkomercistoj, kiuj akiris kaj transportis la «*varon*» al Ameriko.

El tiuj sklavaj laboro kaj merkato rezultis akra dupartiĝo de la insulara societo, dupartiĝo kiu montriĝas tipaĵo de sukerkanaj, kafo- kaj kotonproduktaj landoj, kiaj ekz. *Antiloj*, *Sud-Usono*, *Brazilo*. Ekstis du ĉefaj oponaj klasoj: supre, mastroj kun feŭdaj povo kaj pompo; sube, sklavoj kaj plebanoj, kur mizero kaj subpremo. Flandroj ĉiam apartenis al la unua klaso, supre. Tial, iliaj nomoj konserviĝis ĝis hodiaŭ en la insulara societo...

La nomoj *Monteverde*, *van de Walle* kaj *van Guemert* estas nun vaste uzataj en *Kanarioj*. En *Santa Cruz de La Palma*, estas hodiaŭ du flandraj stratnomoj: *Vandale* kaj *Vandewalle*, laŭ la nun uzata insulara ortografio. Por la alia nomo, *Wangüemert* estas la kutima skribmaniero. Ŝajne ne estas multaj aliaj postsignoj de la flandra paŝo sur la insuloj. Kompreneble, pri ilia sklavmastro-riĉdeveno, la nunaj kanariaj flandridoj scias nenion... El tiu komercepoka tempo, la flandra urbo *Antwerpen* konservas en sia urbodomo pentraĵon (P. Verhaert 1899), kiu montras elspigon de la kanaria sukero en la norda haveno.

Tuj post mia esperantistigo, mi aŭdis pri «*la batalo IOUJO*». Oni instruis al mi la landnoman uzon de *ujo*, kaj ne lerninte Esperanton por ĝin plibonigi, la tuta afero, kvankam sufiĉe miriga, nur modere interesis min. Komence mi provis pesi la argumentojn por kaj kontraŭ, sed poste, ĉar mia pesilo restis fundamenta, mi fakte estis kontenta, kiam la *Ujanoj* gajnis la batalon de UEA kaj mi pensis: ĉio en ordo.

Tamen, konstatinte antaŭ nelonge, ke eĉ la terura milito ne kapablis enterigi *Ioujon*, mi, refreŝigante miajn impresojn, ekhavis la senton, ke mi jam delonge scias la veran klarigon.

Antaŭ dudek kvin jaroj oni instruis al mi la formon «*Belgujo*», sed kiam mi volis logike uzi «*Flandrujo*» oni, je mia miro, protestis, ke mi enmiksas politikon. Mi malfermis la Lingvaj(n) Respondoj(n) kaj laŭtleĝis al la *Ujanoj*: «*Tiel longe, kiel oni uzas por la eŭropaj landoj nomojn de gentoj, ni devas ĉiam uzi tiujn nomojn kun la sufikso ujo.*» Kaj, diras plu *Zamenhof*, kvankam por *Aŭstrujo*, *Belgujo* kaj *Svisujo*, tio ne estas logika, mi ne konsilas tion ŝanĝi per «*jo*», ĉar oni jam kutimigis al la *uj*-formo. Do, «*Belgujo*» ne estis tiel evidenta kiel «*Flandrujo*», kaj kiam mi triumfe rigardis la *Zamenhofanojn*, ili nur evite gestis... Eĉ profesoro *Cart* estis konsultata kaj li respondis: «*Uzo flandro, -a, ujo kiel kataluno, -a, -ujo. Neniu rajtas kontraŭstari.*»

Konkludo: *La Ujo-afero estas politika sur naciisma tereno.*

Poste mi legis, ke la uzo de *IO* fariĝis kvazaŭ politika dialekto en Esperanto (*Butler*: *Enc. de Esp.*) kaj, ke la *IO*-procedo, kiu ŝajne plej sukcesis, kvankam en efektiveco ĝi tute ne estas pli plene taŭga ol la aliaj (...) estas uzata precipe de *SAT*-anoj (*Grosjean-Maupin*, id.).

Kaj en la pasinta jaro *Butler* konstatis ke nun la Esperanto-movado dividiĝas en du kampoj, kaj oni povas distingi per la parolo, ĉu la alparolato apartenas aŭ ne apartenas al komunista aŭ maldekstra politiko. Tuj, li diras, mi sentas, tio ne estas Esperanto, por kiu mi batalis kaj laboris, ĝi estas io fremda, kontraŭbatalenda danĝero por la afero.

Konkludo: *La IO-afero estas politika sur ideologia tereno.*

El tio mi sekvigas ke la *Iouja* afero nur ĉesos, kiel la dramoj de *Shakespeare*, nome pro la morto de la batalantoj. Ĝi ja ne havas lingvan karakteron kaj ruze saltas el la kadro de la gramatiko. Ĝiaj argumentoj apartenas al la strategio kaj al la propagando. Ni do ne miru, ke la ambaŭflanka bombardado per lingvaj argumentoj neniel sukcesas, tial ke la homaj sentoj ilin forpafas.

Pro tio la «*pacaj batalantoj*» principe konformigu al la Fundamento kaj diru kun *Grosjean-Maupin*: Pli bone kaj sendanĝere estas pacience kaj provizore kontentigi je la solvo liverita de *Zamenhof*, kiu ne estas pli kritikbla ol la aliaj proponitaj solvoj. Tio ebligos, ke ni konservu nian unuecon ĝis la tago, kiu certe pli-malpli rapide venos, kiam multaj regnoj, akceptinte tutmondan helpan duan lingvon, decidus per ĝenerala interkonsento neutraligi kaj unuformigi la geografian kaj etnografian terminaron (*Enc. de Esp.*)

Ĉu tio signifas ke *IO* estas senutila? Tute ne: ĝi povas ludi valoran rolon. Tion pravas la solvo aplikita en «*Belga Antologio*», en kiu oni uzis ĝin por formi provincajn nomojn: *Do*, *Flandrujo*, orientala *Flandrio*; *Valonujo*, *Henegovio*, ktp., kaj ĝi krome ebligas distingi inter *Germanujo* kaj *Hitlerio*. Sed, ve, tio denove estas politiko aŭ eble... ideologio.

Yve Murten

Certe ĝi estas la unika nuna postsigno de la flandra koloniigo en la *Insuloj de la Sukero*...

Juan REGULO PEREZ.
Docento ĉe la Universidad de la Laguna (Kanariaj Insuloj).

Postnoto. — *Flandraj aŭ alilandaj interesitoj je la koloniigo de la flandraj en la Kanariaj Insuloj kaj je ties familiaj branĉoj en la arĥipelago legu jenan literaturon, el kiu mi ĉerpis multajn el la supraj sciigoj:*


FERNAND DONNET, Histoire de l'établissement des Anversois aux Canaries au XVIIe siècle, Ambers, 1895.

F. FERNANDEZ DE BETHENCOURT, Nobiliario y blasón de Canarias, Santa Cruz de Tenerife-Madrid.

JOSE PERAZA DE AYALA, Historia de las casas de Machado y Monteverde, Madrid, 1930.

ANTONIO RUMUE DE ARMAS, Don Juan de Monteverde, Capitán General de la isla de La Palma, «*El Museo Canario*», 1946.

Chartes et diplomes de noblesse octroyés, avant et après 1789, aux familles van de Walle et van Zuylen van Nyevelt, Bruges, 1877.



LA PENTRAJO DE P. VERHAERT (1899)

mondparto oni jen ekkonis sukeron. Kaj ĉar la egipta dogano igis la varon tro multekosta, oni ekkultivis sukerkanon unue en la insulo *Cipro* kaj poste, laŭgrade, en la insulo *Sicilio*, *Valencio* (Hispanujo), la insulo *Madejro* kaj fine sur la *Kanariaj Insuloj*. Baldaŭ ankaŭ sur la afrika marbordo, ĉe *Agadiro*.

En la *Kanariaj Insuloj* oni komence ekprovis la starigon de eŭropa kolonio. Nu, kolonio estas lando, kiu produktas varojn por vendo fremden. Antaŭe kaj ĝis tiu epoko, ĉiuj konkeritoj celis nur anstataŭon de la enlanda reganta klaso fare de la konkerintoj. La Mezepoko do ne konsis koloniigadon, sed konkeron. Tiel okazis fare de la araboj en Hispanujo, de la kristanoj ĉe la hispana mezepoka rekonkero kaj kiam la krucmilitistoj konkeris malgrand-aziajn lokojn, kie ili tuj starigis feŭdajn kastelojn por sinjorece vivi el impostpreno. En la *Kanariaj Insuloj* oni do unue intencis koloniigadon. Tiu iniciaton la historio ŝuldas al la francdevena konkerinto *Jean*

Ifnio intense kulturis la sukerkanon. Ĉirkaŭ 1575 ekzistis en tiu afrika marbordo 14 kanmuelejoj, el la plej bonaj tiuepokaj. La sukerkanan ekspluaton la agadiraj maŭroj ŝajne lernis de la portugaloj, kiuj estis 50 jarojn en *Agadiro*, kaj ne de la kanarianoj, kiel iuj supozas.

Sukero estas varo transportebla ien ajn, ĉar ĝin ne difektas tempopaso. Tial, kvankam Ameriko tiumente estis el komerca vidpunkto multe pli malproksima de Eŭropo ol hodiaŭ, la amerika sukero baldaŭ konkuris kun la kanaria en Hispanujo kaj la cetera Eŭropo. La unua amerika sukerŝarĝo ensipiĝis en 1515. La amerika produktado ruinigis la valencian, kiu daŭris de 1480 ĝis 1530. Ĝi malhelpis ankaŭ la kanarian, sed multe pli malrapide. En 1634 estis en *Gran Canaria* 4 kanmuelejoj; dum la XVI-a jarcento la kanmuelejoj de *Aruacas*, *Tirajana* kaj *Tazacorte* ankoraŭ plenlaboris. Nur en 1920 la kanmuelejo de *Aruacas* ĉesigis sian seninterrompan sukerproduktadon, komencitan fine de la XV-a jarcento.

Kiam la sukerkana kulturado instaligis en *Kanarioj* kaj establiĝis la unuaj insularaj kanmuelejoj, la sukerkomercio estis afero internacia. Tial do tiu komercio logis multajn fremdulojn al la arĥipelago. Angloj, flandroj, ĝenovanoj, germanoj plej multnombriis. Tiel estiĝis en la insularo heterogena komerca mondomo. Multaj el tiuj fremduloj fariĝis famaj koloniistoj kaj poste radikigis en la insuloj. Riĉiĝinte ili poste la origino de pluraj ĉeffamilioj, kiuj ludis gravan rolon en la insulara societo. Nu, en tiu epoko, kiam ĉiuj insularaj kanmuelejoj intense laboris, kiam la arĥipelago sukero estis ĉie konata en Eŭropo, la arĥipelago ekster Hispanujo (kaj precipe ĉe la nordeŭropaj landoj) estis preskaŭ ekskluzive indikata per la nomo «*Insuloj de la Sukero*».

El tiu fremda enmigro restas ankoraŭ kelkaj paŝosignoj. Ni hodiaŭ sekvu nur tiujn de la flandroj. De tiuj flandroj, pri kiuj ni trovis ankoraŭajn spurojn.

La unuaj flandroj, pri kiuj oni havas certajn sciigojn, venis al la insuloj komence de la XVI-a jarcento. Jam en 1513 ni trovas unu, kiu aĉetis de ger-

(1) Traduko de la laŭepokaj nomoj: Hai tón makáron nésoi = *La insuloj de la feliĉuloj*

Arua beata = *La beatulaj kamparoj*
Insulae Fortunatae = *La feliĉaj insuloj*

Gezair al-Halidat = *La ĉiamaj insuloj*
Gezair al-Seada = *La insuloj de la feliĉo*

Regnum Fortuniae = *La Reĝlando de Fortuno (el Fortunatae)*

Insulae Canariae = *La insuloj de Kanario*

Pri la etimologio de la vorto *Canaria*, oni hipotezas, ke ĝi ŝuldiĝas al famo pri ĉiamaj, de la mauritania reĝo Iuba aludita, insularaj hundegoj (latine *Canis*, de kie *can-arius* = «*hundohava, hundo-partena, hundeca*»). La nomo de la birdo kanario naskiĝis poste el la insuloj kaj ne inverse. Poste la latina genitivo *Canariae*, de la nomo de la insulo *Canaria* (nuna *Gran Canaria*), sentiĝis kiel pluralo apud insulae, kaj tiel estiĝis *Islas Canarias* (hispane pluralo signiĝas per -s). - Mi petas eventualajn arblin-gvajn samideanojn kiuj legus ĉi tiun artikolon, ke ili informu min, ĉu ĝustas la transliterigo kaj traduko de la arabaj nomoj. —

XIV-a Kongreso FL.L.E.
GENT, 4-6 de junio 1949

VERDA MOZAIKO

EPIZODOJ EL MIA ESPERANTA VIVO.

Priprofesia Orientado
kaj Psikotekniko.

DUA KOMUNIKO

La konsisto de la *Komitato*: Ges-anoj Drs *Mortelmans, Van Neste, Terrijn, D'Hainaut, Van Halter* kaj *De Boes*.
Skribu al: S-ano *De Boes*, *Clementinalaan* 31.

Pagu al: S-ano *Van Halter*; St. *Michielsplein* 8 — *Postëekonto*, n° 4832.56.
Kongreskotizo: 50 Fr. po persono. Ni insiste petas ke tre multaj jam nun faru la giron al S-ano *Van Halter*.

Glumarkoj kongresaj: ili estos haveblaj je 20 Fr. por 100.

LA KONGRESURBO

La diferenco inter *Gent-ĉirkaŭaĵoj* kaj aliaj urboj de nia lando, kio karakterizas ĝin kiel urbon kun rimarkindaj vidindaĵoj estas: imponaj fortikigitaj kasteloj (domoj) kaj mezepokaj preĝejoj; mirinda vico da grandaj monumentoj, meze de la urbo; multegaj memoraĵoj pri la iamaj komercaj korporacioj kaj la gildoj; la *Beginejoj*; sennombraj kanaloj, rivero kaj riverego, kiuj trafluas ĝin sub sesdeko da pontoj; multo da varmkulturejoj, plenaj de ekzotikaj kreskaĵoj kaj nekalkuleblaj florbudoj, kiuj anstataŭas la iamajn legomkulturejojn kaj ĉirkaŭajn kampojn.



Monumento-vico

La malnova Gent

Nenie en *Eŭropo*, malnova haveno estas tiel plaĉe enkadrigita kiel en *Gent*! Eĉ ambaŭ kajoj, la *Graslei* ankoraŭ posedas sian tutan belon kaj ĝia *Spijker* kaj diversaj gildo-domoj spegulas sin en la kviete fluanta *Leie*. Sur la apuda ponto de S-a *Mihaelo* oni ĝuas imponan vidon al la plej grandaj monumentoj i.a. la S-a *Mihaelo-preĝejo*, la centra *Postoficejo*, la S-a *Nikolao-preĝejo*, la *Belfrido*, la *Haltoj* kun la *Raadskeider* kaj la ĉefpreĝejo de S-a *Bavo*.

Ĉe la alia flanko, trans la malnova haveno, levigas la bildo de la ĉefa turo de la *Grafa Kastelo*.


Krom multajn korporaciajn kaj gildajn domojn kaj aliajn, *Gent* posedas du *Beginejojn*, ĉirkaŭmurigitajn urbe-tojn, mezepokajn restojn kun multegaj skulptaĵoj kaj pentraĵoj. En tiu rilato ni cetere citu: la *Muzeon de Antikvajoj* (en la iama abatejo *Bijloke*; la



Bijloke - Muzeo

Stonmuzeon (ruinoj de S-a *Bavo*); la *Muzeon Ornamentaĵoj* kaj *Industrio* (en belega domo *Ludovik-15-XV-a*, kun plej bela interna korto, multegaj meblaroj kaj faka biblioteko); la *Muzeon de Folkloro*; la *Lernejmuzeon*.

Gent, Universitat-urbo.



Universitata Biblioteko kun Libroturo

Gent posedas famkonatan *Universitaton*, starigitan en 1817 de *Willem van Oranje*. Ĝi fieras pri grandega biblioteko kun pli-malpli 1.000.000 da libroj, inter kiuj *Esperantaj verkoj*.

LA PLEJ BELA KOLORO.

Kune kun amiko *A. Cseh* mi preparis akcepton de rumana Esperanto-kongreso. Ni intencis ornamti la akceptejon per verdaj steloj kaj sendis knabon — novbakitan esperantiston — aĉeti verdan paperon. La komisiita knabeto revenis kun ... blua papero. Ni tre miris pri tio. Sed la knabo respondis:

— La sinjoro komercisto diris, ke li momente ne havas verdan paperon, sed li garantias, ke la blua koloro estas eĉ pli bela ol la verda.

ESPERANTISTA REKONILO.

Ĉar en niaj vicoj estas ankaŭ vegetaranoj, abstinantoj, filatelistoj ktp., eksteruloj sufiĉe ofte intermiksas nian ideon kun aliaj. Okazis foje en *Rumanujo*, ke provante iun varbi al Esperanto, li demandis min singarde:

— Ĉu la Esperantistoj festas la semajnfinojn sabate, aŭ dimanĉe ...

Amiko *Andreso Cseh* kaj la subskribinto estas transilvanianoj. En nia provinco oni iam enkondukis la modon: promeni senĉapele dum la pli varma parto de l' jaro. Ni rapide alprenis tiun kutimon kaj enkondukis ĝin en la Esperantistan rondon de *Bukureŝto*. Tie la afero vekis ne malmultan atenton, ĉar en la kaj polvorita ĉefurbo oni ne tre kutime iras sen kapo kovrilo.

Foje ni revenis al la Rumana Esperanto Centro post kelkhora foresto. Nia mastro akceptis nin kun la sciigo, ke dume Esperantisto serĉis nin, sed ke, vidinte la ŝlositan pordon, li baidaŭ foriris. Ni demandis nian mastron, kiel li rekonis, ke la fremdulo estas Esperantisto, ĉu eble pro lia insigno? Li respondis naturvoĉe:

— Mi tute ne bezonis kontroli, ĉu li havas iun insignon, ĉar mi tuj komprenis ke li estas esperantisto, ĉar li iradis sen ĉapelo.

NE DORMU, SED LERNU ESPERANTON

Foje mi estis en malgranda, sed pro siaj montegoj kaj lagetoj mondfame bela lando. Mi prelegis en iu urbeto pri *Rumanujo*. Fidante la informon de mia afabla interpretisto, mi iris al la stacidomo iom antaŭ noktomezo. Tiam ni aŭdis, ke la lasta vagonaro foriris je la dekunua vespere. Sed mia interpretisto insistis, ke lia fervoja horaro klare indikas vagonaron noktomezan. Gentila fervojisto diris:

— « Vi pravas, sinjoro, laŭ via *some-ra* horaro, sed nun estas ja *vintro* ».

Ni volis eniri la fervojan restoracion, sed ĝi jam estis fermita. Do ni eksidis en la atendejo. Tie pluraj personoj dormis, aŭ duondormis. Sed mia energia akompananto iom tro laŭte komencis diskuti pri taŭgaj manieroj por propagandi nian lingvon. Mi estis pli juna ol li, tial mi nur hezite flustris al li: pardonu, samideano, sed jam pasis noktomezo kaj pluraj dormas ĉi tie. Tiam li eksciite respondis plengorge:

— Ili ne dormu, sed lernu Esperanton! Li efektive sukcesis veki kelkajn dormantojn en la atendejo, sed mi apenaŭ povas kredi, ke eĉ unu el ili iĝis amiko de esperanto.

AGRABLA VENTRO...

Survoje de *Stokholmo* al *Krakovo* mi haltis en *Varsovio*. Ĉarma pola samideano *B.K.* gvidis min. Si estis novbakita esperantisto, kiu tamen relative bone uzis nian lingvon. Versajne antaŭa kono de franca, germana ktp. lingvoj helpis ĝin. Sed kono de pluraj lingvoj povas kaŭzi ankaŭ intermikson. Ekblovis agraba somervento. Mia konatino rimarkigis al mi:

— Kiom agrable blovas la ventro!

Mi protestis milde:

— Pardonu, fraŭlino, kutime la ventro ne blovas agrable...

— Si post pensado kaj subita ruĝiĝo:

— Ho, pardonu, ĉu mi vere diris « ventro », mi opiniis « venton »!

« L' AVENO DE L' OMARO »

Kiel konate la francoj ne elparolas literon « h ».

Instruante nian lingvon al ĉarmaj knabinoj en komerca altlernejo *Ecole de Haut Enseignement Commercial pour Jeunes Filles* en *Parizo*, mi konsilis al ili surspiri spegulon dirante « h-o, h-o, h-o... »

Foje mi devis fari radioparoladon en la pariza sendstacio « *Ejela Turo* ». An-

Gent, havenurbo.

Ĝi estas la dua de la lando kaj estas ligita al la *Norda Maro* per markanalo via *Terneuzen* (Nederlando). Dank' al sia moderna ilaro, oni ŝargas kaj malsarĝas la ŝipegojn tute rapide, tiel helpante la multajn teks-fabrikejojn kaj metal-industriojn. Ankaŭ la malsarĝo de minejligilo estas ĝia specialaĵo.

La *gent-a* kuirarto estas ideala por la mangodelikatulo; sed ĝi estas nek la lasta, nek la plej malforta logaĵo, ĉar la frandemulon atendas multaj tradiciaj

taŭ mi franca samideano faris dulingvan turisman paroladon pri *Bulonjo-sur-Maro* (bone konata de la esperantistoj pro la unua universala kongreso en 1905). Transirante de la franca al Esperanto, li uzis nacian elparolon. La radio-oratoro diris:

— *Bulonjo* estas l' ...aveno de l' ...omaro.

(Li volis diri: *Bulonjo* estas l' haveno de l' homaro.)

Mia sveda akompanantino rimarkigis al mi:

— Se li dirus « *buljono* » anstataŭ « *Bulonjo* », li prezentus kompletan menuon...

PAKITAJ PULOJ.

Foje demandis min saksa samideano:

— Ĉu vi ŝatas pulojn?

Mi, eksalte:

— Kion vi opinias?

— Pakitajn pulojn.

Mi, proteste:

— Tute ne!

Li, mirege:

— Ĉu vi ne ŝatas pone pakitajn pulojn? La saksan specialaĵon!

Mi:

— Bonvolu skribi sur paperon la nomon de la mangajo.

Kaj li skribas: « *Bakitaj buloj*. »

Mi, post ĝoja kompreno:

— Koran dankon anticipu! Sed alfoje atentu ĉe la elparolo pri la diferenco inter « b » kaj « p »!

TRIJARULETO DEJORAS KIEL INTERPRETISTO.

Invitita al *Latvujo* mi vizitis familion *Groot* en *Riga*. Amiko *Edgart Groot* multe skribis al mi pri sia trijara fileto *Ilgonis*, kiu deponis sia naskiĝo aŭdis latvajn vortojn de sia patrino kaj Esperantajn de sia patro.

Kiam mi alvenis, la infaneto dormis dum posttagmeza ripozo. La patro vekis lin, kvankam la gastoj protestis kontraŭ tio. La patro argumentis:

— Li jam dormis sufiĉe!

Kompreneble la infano vekigis en malbonhumoro, murmurante kelkajn latvaj vortojn. Mi demandis kion li diris? La patro klarigis:

— Li diris, ke la onklo estas malbona, ĉar pro la gastoj oni ne lasis lin dormi.

La patro vane klopodis eligi eĉ unu Esperantan sonon el la dormema infano. Mi komencis dubi pri lia esperanto-kapablo. Sed la dormemo baldaŭ flugis for. Kaj *Ilgonis* prenis miajn manojn alparolante min... latve. Kiam lia patro klarigis al li, ke mi ne komprenas tiun lingvon, sed li devis paroli kun mi same, kiel kun sia patro, ektrilis la klara infanvoĉo:

— Onklo, venu al la *tagmandjo*!

Poste sekvis vigla konversacio ĉe la tablo en nia lingvo, kiun la eta *Ilgonis* fervore partoprenis. Kaj kiam iu vorto mankis al li, li mem fabrikis ĝin laŭ la legoj de nia lingvo. Ekzemple li volis diri, ke la floro malbone fartas en troa suno kaj ke oni devus meti ĝin en ombbron, jene esprimante sin:

— Metu la *fjojon* en « *malsunon* »!

Ĉe la fino de mia gastado mi devis mem reiri de la marbordo al la fervoja stacio, ĉar la gepatroj de *Ilgonis* enurbe. Ili lasis kun mi la etan *Ilgonis* kaj latvan servistinojn, kies lingvon mi tamen ne povis kompreni.

Survoje ni vidis kuŝi malpurajn. La ordema spirito de la infano tuj evidentigis:

— Necesas enfosi *majpujason*!

Ni volis ekscii kiom longe daŭras la irado al la stacio. Kaj Esperante demandis tion al la infano. Li samlingve parolis al la servistino. Kompreneble la latva knabino nenian komprenis. La eta *Ilgonis* havis nenian nocion pri ideo de nacio kaj lingvo. Do mi provis petante, ke li diru miajn vortojn al la servistino same, kiel li kutime parolas kun sia patrino.

Kaj vere la infano latve ekparolis al la servistino. Li eĉ ripetis latve (!) la klarigon de la servistino al mi. Mi refoje provis petante, ke *Ilgonis* klarigu al mi la vortojn de la servistino same kiel kun sia patro. Efektive venis tiam la respondo en nia lingvo:

— La irado al la stacio daŭras proksimume duonan horon.

Tiel do servis al ni per Esperanto trijaruleto kiel interpretisto, inter rumano kaj latvino.

TIB. MORARIU

(Kopirajto rezervita)

mangajoj: *gent-a* miksmangajo, supraĵo de kokidoj aŭ fiŝoj, kunliklo kun prunoj, spicleporaĵo, moruo flandre preparita, *gent-a* kradorostitaj angiloj.

Gent, urbo de la floroj.

Estigis en *Gent* la ĝardenkulturo. Jam en la XVII-a j.c., la ĝardenoj de la Episkopo *Antonio Triest* estis mondfamaj, same kiel nun la *Gentaj Florarioj*, kiuj okazas ĉiun kvinan jaron kaj invitas florkulturistojn el la tuta mondo.

La Kongresa Komitato

La knabo estas dek kvar-jara. Kian profesion aŭ metion li preferos poste? Ĉu li estos taŭga? La priprofesia orientado helpas.

Alia ekzemplo: La junulo jam laboras en fabriko. La entrepreno postulas kelkajn specialistojn en lia profesio. Ĉu ankaŭ li estos kapabla? La psikotekniko decidas.

Psikotekniko

Post tiuj ekzemploj kaj por klare kompreni la problemon, estas necese tuj difini la erojn de la titolo.

Priprofesia Orientado estas metoda distribuo de lernantoj en diversajn metiojn laŭ iliaj apartaj taŭgoj (geschiktheden) kaj gustoj; ili do ne jam havis metion antaŭe.

Psikotekniko, ido de la eksperimenta psikologio, ankaŭ estas priprofesia orientado, sed iom pli: ĝi indikas la elementojn plej kapablajn (bekwaam) por plenumi profesion taskon — alivorte, ĝi serĉas la plej bonajn metiistojn aŭ profesiistojn el grupo da homoj, kiuj jam havas la koncernan okupon de kelka tempo.

Ni klarigu la aferon unue rilate al la profesia orientado junulo: kiu ankoraŭ estas senmetia do konsultas « orientiston », kiu ekzamenas ĉu li fizike, fiziologie, psikologie kaj normale taŭgas por iu profesio. Estas du kazoj: 1) la subjekto jam elektis profesion — la pli facila kazo. Tiam oni esploras ĉu jes aŭ ne li taŭgas por ĝi; 2) la subjekto ne jam scias kian metion li adoptos. Tiam oni konsilas grupon da profesioj, en kiuj li povos sukcesi.

La tasko de la psikoteknikisto estas iom alia: ekzemple, ducent personoj havas saman metion, sed oni bezonas nur cent; tiam oni elektos el tiuj ducent, la plej bonajn.

Oni povus aserti: « jen ekspluato de la laboristoj, por la nura profito de la fabriko! » Oni erarus: ĉu la laboristo ne kapablos uzi siajn plej bonajn fortojn kaj tiel gajni kiom eble plej multe?

Ni konkludu: ambaŭ metodoj celas indiki la ĝustan homon en la ĝusta loko (the right man on the right place!).

Sed ĉu tio eblas? Nu jes, ĉar dum multaj jaroj oni tiucele serĉis la plej efikajn metodojn. Efektive eksperimentaj pedagogoj, kiaj *Stern, Münsterberg, Binet, Burt, Terman* k.a., ekzamenis dekmilojn da junuloj kaj determinis inteligentuskalon.

Ĉi tiu mezurilo ebligas al ni deklari kun granda certe ĉu iu estas: 1) Mensodebila (geesteszwak); 2) malpli talenta (verstandelijk minderbegaafd); 3) normale talenta (verstandelijk normaalbegaafd); 4) pli talenta (verstandelijk meerbegaafd); 5) talentega (verstandelijk buitengewoon knap begaafd).

La priprofesia problemo prezentas diversajn aspektojn, el kiuj ni citu: la elekton de profesio, ĝian lernadon kaj la metian etikon (sciencon pri la moralo).

Ankaŭ la psikotekniko havas diversajn taskojn. Kontribuas al ĝi ankaŭ inĝenieroj kaj fabriko-kuracistoj por 1) varbi metiajn lernantojn; 2) metode orienti ilin laŭ la antaŭselektu (preselectie); 3) atente observi ilin dum la metia lernado; 4) kontroli iliajn kapablojn ĉe la fino de la metia lernado. Ni krome notu ke 5) ĝi provas malebligi akcidentojn kaj metiajn malsanojn, speciale en la dangejoj postenoj; 6) kaj prizorgi la plej fruktodonan organizadon de la laboro laŭ medio, materialo, ilaro, maŝinoj, k.t.p.; 7) ĝi intervenas, almenaŭ parte, en la promocioj, ne nur en la fabrikoj sed ankaŭ en la oficejoj, ekzemple en la poŝto kaj ĉiuj grandaj bankoj kaj magazenoj.

Ekzamen-metodoj

La priprofesia orientado baziĝas sur:

- 1) lerneja kaj sociala informado
- 2) gvidata observado de la karaktero, la sperto, la intelekto;
- 3) Fiziologia kaj medicina esploroj;
- 4) psikologia ekzameno per testoj pri la intelekto kaj la ĝeneralaj kapabloj.

Intervenat: la « orientisto », la kuracisto (ofte ankaŭ « orientisto »), profesiaj kaj socialaj asistantoj, flegistinoj.

La psikotekniko baziĝas sur:

- 1) informado fare de la socialaj servoj;
- 2) medicina kaj 3) psikoteknika ekzamenoj per metiotestoj aŭ psikoteknikaj laboratoriaj aparatoj.

Kunlaboras tiuj, kiuj en la profesia orientado, sed krome la inĝeniero (tre ofte ankaŭ mem psikoteknikisto).

Ambaŭ sciencoj evidente ne estas tute diferencaj. Por la unua kaj la dua la celo estas: indiki al la kandidato la plej bonan profesion por ke, ŝatante sian metion, ili gajnu — sen danĝero por sia morala kaj sano — kiom eble plej multe.

Leo Vercammen

Babilado

La oficialaj instancoj kaj la gvidantoj de diversaj naciaj aŭ internaciaj movadoj fariĝis pli « Esperantemaj » ol antaŭ la milito ; aliflanke la granda amaso ne plu tiel entuziasmas pri niaj debat-vesperoj, kursoj. Diversaj kaŭzoj ludas, sed restas la fakto ! Povas do esti ke, kvankam niaj sekcioj aŭ reprezentantoj klopodegis por organizi vintran kurson, la sukceso forrestis. En tiaj kazoj ni eluzu tamen la kunlaboremon de junulargrupestroj (skoltoj, K.A.J.) aŭ de kulturaj movadoj (V.E.B., V.P.B., V.J.C., Davidsfonds, Willemsfonds).

Ne jam tro malfruas por instigi al aranĝo de debatvespero aŭ kurso ĉe lokaj sekcioj de la menciitaj kaj aliaj asocioj (legu en *Plaatse-lijk Nieuws* raporton pri tia aranĝo en *Roeselare*). Ne skribu, sed persone preparolu la eblojn kun la gvidantoj. Bonan sukceson !

Nepre tro malfruas por aperigi detalan raporton pri nia statuta ĝenerala Ligkunsido (Brussel, 21. XI.48) ; ni tamen rakontu koncize al vi ĝiajn esencajn novaĵojn.

La ĉeesto estis multnombra : ja preskaŭ ĉiuj sekciaj delegitoj kaj reprezentantoj, multaj aliaj geamikoj ! Kaj la antaŭa estrarkunsido montriĝis same fruktodona kiel la ĝenerala kunsido mem ! Jen legu !

Post la sekretaria kaj financa raportoj, ekzameno de la UEA-problemo, kiu post 18 jaroj ja definitive solviĝis ; tiam, unuanima aprobo de la Kontrakto L.E.E.N (kompleta teksto, p. 3) kaj pri komuna organizado de somera ferio en *Kerk-Avezaath* (Ned.)

Kaj aprobo de la bilanco pri la Kongreso 1948 : pli ol 1.000. — Fr. la duono de la profito, ĝojigis nian Kasiston !

Kaj interesa konkurso instigos la varbadon de Membroj kaj Amikoj : cirkulero komunikos la detalojn ! Ĉar estos ja du kategorioj da Amikoj : de 15 kaj 25 fr. (ĉi tiuj ricevos ĵarabonon *De Esperantist* !)

Kaj ankaŭ en la problemoj de instruista fakto en V.E.B. estis esplorata : ĉiuj membroj-instruistoj sin anoncu ĉe *Drs Roose, J.* en M. Sabbe, 36, Brugge, por ke ankaŭ sur tiu tereno ni atingu la sukceson !

Kaj krome por 1949, diversaj planoj estis prezentitaj !

La liga Prezidanto klare skizis retrospektivon kaj nian estontan agadon : ĉio ja esperiga ! Sed ni ne forgesu ke Estrara laboro ne sufiĉas ! Ĉio dependas ja de la membraro, kiu, post ellaboro de la principoj, ni *parolvicu, sed agadvicu* !

Karaj membroj, vi ne seniluziigu vian Estraron : ĝi preparis la teron sed helpu la kreskon de V.E.B., via Ligo, simbolo de via Esperanto-Idealo, ja vi !

Via Sekretario,
G. Maertens.

Aforismoj

Ekzistas nur malbona prozo, la bona estas poezio.

La valoron kaj efikon de la vorto determinas la silento, kiu ĝin antaŭas kaj la silento, kiu ĝin sekvas.

Pacienco estas la plej alta kaj utila virto de poeto : sian tutan vivon li pasigas, atendante kelkajn momentojn.

La pesimisto diras : la vivo estas kontinua mortado ; la optimisto diras : ĝi estas senfina serio da naskiĝoj, kaj ambaŭ diras la samon.

Ĉiu vorto atencas la absoluton.

Romantika amo estas pleonasmo. Se amo ne estas romantika, ĝi neniel estas amo.

Sen sterko, ne floro kaj arto estas floro.

Kiuj vojaĝas aviadile perdas la teron, ne atingante la ĉielon.

J. GRESHOFF (tradukis : Hedero).

bibliografio

DU AMOSENTAJ NOVELOJ — *Imenlago de Th. Storm kaj Maruška de M. Escherich* ; el la germana : A. Bader, eld. *Svisa E. Societo*, 1947, 41 p. Havebla ĉe F.E.I. : 22 b. fr. (L.R. IV).

En la unua noveleto ni konatiĝas kun la honesta, sed malfeliĉa, amo de *Elizabeto* kaj *Rejnardo* ; mallongaj ĉapitroj pentras ĝiajn diversajn epizodojn.

En la dua ni legas la enamigon de maruška al moskva grafo *Vladimir de Kajtzyk* kaj kiel ŝi fariĝas lia « lupfianĉino », oferante sian vivon por savi lin de la lupoj.

La lingvo ne tro plaĉas al ni : la transigo ŝajnas sklava, iom mallerta kaj la vort-ordo, -elekto kaj stilo ne impresas kiel klasika Esperanto, kvankam sendube la kaŭzo parte estas la deziro de la tradukanto redoni la simplecon de la originala teksto.

Ni substrekis i.a. jenajn malperfektaĵojn : *ŝajni + infinitivo* (4-11-ktp) ; *nun* estis nokto (5) ; *ankaŭ* (erare lokita aŭ uzata : 5-13-16-18-ktp) ; anstataŭ tiu ĉi (tiun ĉi : 5) ; mangi panon seke (seka : 7) ; *voki* (*krii* : 8-9-11-12 -ktp) ; iri unue (unua : 8 aplaudi per la manoj (9) ; alproksimiĝi (proksimiĝi) ; *daŭrigi* (diri plu) ; iri por preni (iri preni : 12) ; senti la aeron en sia frun- (sur : 12) ; *kuŝi* (situi : 21) ; resti laborante (laboranta : 22) ; ĉirkaŭnaĝis runde (26) ; li estis proksime de (proksima al : 26) ; *desuprenpendantaj* (?) bukloj (28) ; li aŭdis E. irantan (iranta : 29) ; esti de blindiga beleco (blindige bela (32) ; vilaĝana belulino (vilaĝa : 33) ; konatulo (konato : 36-40). Ni krome ne klare komprenas jenajn vortojn aŭ esprimojn verŝajne naciismojn : *malarbitre* (4) ; *malvideble* (8) ; *frisjako* (15) ; *komputi* (16) ; *gajni la grandan loton* (20) ; *loĝadomo* (21) li *volis nenion aŭdi* (32).

La tuta restas tamen ĝinda kaj la preso kaj aspekto de la libreto estas senriproĉaj.

T.V.G.

DIABLET' EN LA BOTEL' de R.L. Stevenson, el la angla : J. Seka, eld. H. Harasin, Mozartstr. 6, Mainz (Germanujo), 1948, 46 p.

La rakonto fakte honoras la fidelan edzinon, kvankam ĝia loĝaĵo estas simpla botelo, kiu enhavas strangan diablon...

Germano transigis el la angla : io evitenda kaj ni supozas ke la lingvaj riproĉoj precipe devenas aŭ de tiu fakto aŭ de specialaj traduk-konceptoj de J. Seka. Mi notis — almenaŭ ĉefe — iam strange konstruitajn frazojn, mirigajn esprimojn, trouzon de mal-kunmetaĵoj (precipe en verboj), de la sufikso -jn-, de kelk-kunmetoj.

Se oni konsideras ĉion, la tuto restas leginda, kun aspekto plaĉa kaj papero meze bona. La eldonisto deziras kunlaboron de taŭgaj E-istoj (tradukantoj aŭ verkistoj) por eldoni pliajn verkojn ; interese tuj sin turnu al li (adreso supre indikita).

GAJA LEGANTO per Esperanto, verkis kaj kompilis P.E. Schwerin, eld. *Esperanto Publishing Company Ltd.*, Rickmansworth, Anglujo, 56 p. (prezo : 5 resp. kup.)

La supra libreto, kun plaĉa aspekto kaj lingve facila, enhavas spritaĵojn, vortludojn, preserarojn, anekdotojn, tematikajojn, rimaĵojn, societludojn, konsilojn por grupestroj kaj kursgvidantoj, demandaron. Tre utila por gajigi kaj agrablighi la sekciajn kaj aliajn vesperojn.

Hedero.

NI DEVAS DIRI ĜIN de Hermann Wagner, eldonis Kultur-Aufbau-Verlag, Stuttgart, 1948, 84 p.

POPULARA LERNOLIBRO DE ESPERANTO, internacia Gramatiko por Komencantoj, de Ludoviko Kökény, eldonis *Literatura Mondo*, Budapeŝto, 1947, 64 p.

KARLO de Edmond Privat, facila legolibro por la lernado de Esperanto, eldonis *Eldono de Brazilia Ligo Esperantista*, Rio de Janeiro, sen dato, 43 p.

SVEDA LABORISTA MOVADO, de Tage Lindbom, eldonis *Sveda Laborista Esperanto-Asocio*, Stockholm, sen dato, 92 p.

LERNU ESPERANTON, Daniel Quarello, eldonis Quarello & Cia, Buenos Aires, 1947, 32 p.

ĈE LA SANKTAJ AKVOJ, unua kaj dua partoj, de J.C. Heer, el la germana de A. Bader, P. Le Brun, J. Schmid, eldonis *Svisa Esperanto-Societo*, Bern, 1947-1948, 82 kaj 135 p.

SEP FRATOJ, rakonto de A. Kivi, el la finna tradukis *Ilmari Ekström*, eldonis *Vilho Setälä*, 360 p. sendato.

Pro diversaj kialoj, la laste cititaj, ne jam recenzitaj, verkoj, restis neĵigitaj. Ĉe la sanktaj akvoj kaj *Sep fratoj*, preci-

pe ĉar la esploro estis tiel longa kaj aldonigis kompara studo, koncerne la tradukan valoron. Aŭtoroj kaj eldonejoj ne timu : ili atendu la esperplanan ĵaron 1949, ĉar la manuskriptoj ja atendas.

La Redakcio.

ANONCETOJ

Ĉiu vorto aŭ mallongigo : 0,75 bfr.
Enpresigo kostas minimume 15 bfr.
Unu int. respondkupono valoras 3 bfr.

Senlabora kultura eks-inspektoro departementa en Hungarujo volonte farus kian ajn laboron : aranĝi en hejmo privatajn aŭ oficialajn aferojn por eksterlandaj hungaroj aŭ aliaj s-anoj ; plenumi — kiel agente — komercajn mandatojn de fabrikoj aŭ komercaj asocioj, ktp. Adreso : Sro Pál Liszy, Kathy József-u 10, Székesfehérvár, Hungarujo.

ESPERANTISTA TEATRO ! En Germanujo estas fondita la unua Teatro de la Movado. Kiel teatro migranta, ni intencas vojaĝi al multaj landoj por aktori bonajn teatraĵojn. Interesatoj, artamikoj viciĝu en nian rondon ! Vi helpu la realigon de nia projekto por la progreso de la ESPERANTO-MOVADO. Multnombro skribu al : Profesoro A. Steynhardt, LUNEN Westfalen, Viktoriast. 39 d., Germanujo (Britische Zone). Informoj : kontraŭ unu resp. kup.

Sendu kvanton da p.m. de via lando kaj mi sendos saman kvanton de Svedujo. Ankaŭ laŭ bazo de katalogo *Zumstein* 1949. Dir. *Walfrid Wollin*, Torggatan 1, Skövde, Svedujo.

Helpu la portugaliajn esperantistojn !

La portugala esperanto-movado renaskiĝas nun sub la malsimpatia rigardo de la registaro ; tial ĝi bezonas la helpon de ĉiuj esperantistoj. Helpu tiujn samideanojn sendante unu esperanto-libron por ĝia « Cirkulanta Biblioteko ». La librojn sendu al : PORTUGALA ESPERANTO-LIGO, Apartado, 125, Lisbon N.

LA PONTO

oficiala revuo de
Germana Esperanto-Asocio
Ĵarabono 7 resp. kuponoj
duonjaro 4 resp. kuponoj
Redakcio « La Ponto » Engelberststr. 7
(13b) München-Pasing, Germanujo

N.M. JOHNSON, 14, Regent Squ., Doncaster, Yorkshire, (Anglujo), 12-ĵara, nepre deziras korespon kun samaĝul(in)oj !

La Belga T.J.O. sekcio sendos al ĉiu paginto de 10 fr. (eksterlando : 3 r. kup.) belan manpentritan kalendaron 1949. Subtenu la junular-movadon. Mendu tuj ĉe R. Borremans, rue de Bériot, 2a, Brussels.

SVEDA ESPERANTO GAZETO « LA ESPERO ». Jam trovis admirantojn tutmonde pro interesa enhavo, bela preso kaj regula apero. Se vi deziras abonon ĝin dum 1949, vi povas pagi la abonkotizon 73 frs. al ni kaj vi ricevos rekte el Svedujo ĉiumonate 8—, 12—, aŭ 16—, paĝan numeron, ĉefe esperantlingvan. Turnu vin al :
F.E.I. — P. Van Humbeekstraat, 3 — Brussel-W.

LE TIMBRE

Le Journal du Philatéliste
Het goedkoopste
Het best geïllustreerd
Het best ingelicht.
Het nr. f. fr. 20 = b. fr. 3,00
Abonnement 1 jaar :
België = f. fr. 250 = b. fr. 40.
Gratis proefnummer op aanvraag

Publiceert maandelijks een rubriek in Esperanto.
5, rue Lamartine
PARIS (IX) Frankrijk
P. C. R. Paris 5.390.55

Tria Listo

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1949.
11. S-ro Goossens G. Lokeren. 150 fr.
12. F-ino Jurion R. Grugge. 150 fr.
13. S-ro Paeleman L. Herseeuw. 150 fr.
14. F-ino Top M. J. Veurne. 150 fr.

Plaatselijk Nieuws

V.E.B. Afdeling Antwerpen : Op 11. 10. hadden wij een mooie voordracht van vriend *Vermuyten*, de bekende auteur en medewerker van *Flandra Esperantisto*; hij sprak over *De Antwerpse Reinigheidsdienst* en slaagde er in talentvol en geestig dit prozaische onderwerp te behandelen, zoals hij verleden deed over *La Pulo*.

Als oefening in het E. werden voordrachten gehouden : Mevr. *Van Haeren*, een nieuw lid, las een mooi gedicht voor.

Het programma voor December werd als volgt vastgesteld : 4.12., Partopreno en la decembra Festo de V.E.B. Brussel; 6. 12., *Sankta Nikolao*, Surprizvespero; 13.12. *Zamenhofvespero* kaj lastaj aranĝoj por la Novĵarfesto; 20.12., Kantvespero (gvidata de Sro *De Winter*) ; 27.12., Rerigardo pri la sekcia vivo 1948.

V.E.B. Afdeling Brugge : Werkvergadering van 14.X. Nieuwsjes uit de E. bladen en grammaticale oefeningen. Op 21.X : oplossen van *enigmoj* en proeven van telepatie enz. door *Verda Steb*. Op 28. X : A. *Claeys*, lid dat weldra naar Congo vertrekt, sprak over *Negerplastiek*. Op 4.11 : grammatica en nieuwsjes uit de E. wereld ; er werd door de Propagandisto een oproep gedaan tot werving van nieuwe Bondsleden. Daarenboven om de 14 dagen : oefeningen in volks- en reidansen. Iedere Vrijdag gaat de cursus voor nieuwelingen door : totnogtoe mochten wij ons verheugen 18 cursisten te begroeten.

V.E.B. Afdeling Brussel : Er wordt de V.E.B.-leden medegedeeld dat op Zaterdag 4 December e.k. te 20 uur onze afdeling haar jaarlijks feest inricht in de « Vlaamse Club », stemmig zaaltje. E. Jacquainlaan, 121 te Brussel. Wie verleden maal van de partij was, ontbreekt wellicht dan ook niet !

V.E.B. Afdeling Mechelen : De vergaderingen gaan geregeld door ; op 9.11. 1948 werd een geschenkje overhandigd aan de echtelingen *Luyten-Janvier*, bij de geboorte van hun eerste kindje, *Dirk*. Reeds 18 leden zijn ingeschreven voor een reis naar Helsingör (Denemarken) in 1949 en sparen te dien einde wekelijks. Voor de Zamenhof-viering wordt een speciale avond vastgelegd op 14 December.

V.E.B. Afdeling Oostende : Op 24-10 werd onze eerste-jaarcursus met geringe belangstelling, een krachtige propaganda ten spijt. Op 27-10 begon onze tweede-jaarcursus met heel wat meer deelnemers en onder leiding van Dhr. Van Tournhout ; deze cursus vindt plaats iedere Donderdag van 19 uur : alle oud-Esperantisten zijn welkom. Onder leiding van het Feestcomité werd druk gewerkt aan de inrichting van ons jaarlijks bal (27.11.48) waarvoor een degelijke propaganda wordt gevoerd : een tombola, de aanstelling van een dansleider, de verkiezing van een Esperanto-keizer en keizerin komen deze maal gewis voor op het programma, en dit in de zaal *Casanova*, Langestraat.

V.E.B. Roeselaers : In Roeselare ging, op initiatief van onze vertegenwoordiger, te Rumbek, S-ano A. VAN LEUVEN, en van S-ano J. COEL, Hoofdonderwijzer, een propaganda-avond met Esperanto-proefles door in een lokaal van de vrije middelbare school.

Meer dan honderd leden van de plaatselijke jeugdgroeperingen en van het Davidsfonds waren aanwezig. Er zal onmiddellijk met drie cursussen aangevangen worden, gezien de talrijke inschrijvingen. Dit resultaat werd voornamelijk bereikt door het bewerken van verschillende groeperingen die hun steun toezegden. De V.E.B. rekent op het spoedig oprichten van een plaatselijke afdeling.

Hoekje van de Penningmeester

Dit nummer is het laatste van het bondsjaar 1948. De twaalf voorbije maanden waren, uit alle oogpunten, verheugend voor onze organisatie. Wij zijn derhalve overtuigd van de trouw onzer leden, die zonder verwijl hun bijdrage zullen regelen, hetzij door de afdelingen, hetzij rechtstreeks, wat betreft de alleenstaanden, door storting op P.C.R. 2321.50, V.E.B. Brussel ; die bijdragen belopen : 75 Fr. ; INWONENDE leden betalen slechts 25 Fr., STEUNENDE leden, minimum 150 Fr.

Wie het volgend nummer F.E. wenst te ontvangen, betale VOOR 1 Januari 1948 ; na die datum wordt onmiddellijk met de inning door de post aangevangen : onze leden zullen ons bereidwillig dit werk besparen !



NOVAĴOJ

Francujo-Vienne (Isère)

De la 15.10 ĝis la 11.11. okazis tie interesa propaganda ekspozicio. Dank' al la internaciaj rilatoj de la anoj de *Sunradio* (loka grupo) kaj precipe de F-ino Rouvier, kiu ĉeestis la Kongreson en Malmö, oni kolektis multajn kaj diversajn dokumentojn.

La publiko admiris la internacian gazetaron, poŝtmarkojn, turismajn broŝurojn, literaturajn studlibrojn, fotojn pri diversaj kongresoj (UEA-SAT) kaj manifestacioj: FERIAJ KURSOJ (*Elsinoro*), SOMERLERNEJO (*La Rochelle*), Ekspozicio de Infandeseĝnaĵoj (*Lyon*), Festo de la 40-jara jubileo de la *Sunradio*.

La lokaj gazetoj favore raportis pri la okazaĵo. Kurso komenciĝis kun 10 novaj lernantoj kaj okazos ĉiunmerkrede.

« Danlando »

La dana Ministerio de Eksteraj Aferoj eldonis novan senŝonan filmon pri « Danlando »; ĝi estas verkita de *Preben Frank* kaj larĝa 16 mm., longa 240 m.; ĝi daŭras 45 minutojn.

La filmo estas *senpage* prunteprenebla; same turismaj broŝuroj, disdonataj ĉe la filmprezento. Nepre petu informojn ĉe F.I.L.E.!

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

La PREMION gajnis post n-roj 49-50: s-ano J. R. Van Eynde el Wilrijk.

Nuna stato de la konkurso: Van de Pitte: 90; De Kersgieter kaj Lodema: 88; Iserentant: 81; Marmenout kaj A. Pintelon: 70; Jurion: 60; G. Maertens: 50; R. Pintelon, F. Roose kaj Sekcio Gent: 45 k.t.p.

SOLVOJ.

N-ro 51. rompigi; alianco; justeco; duobli; impreso; superi; ursino; rostajo; ĉasisto; ekzisti; ventego; almenaŭ; lumefekto; operacii; ondolinia; najlotirilo.

Rajdi sur ĉevalo oni ne lernas sen falo.

N-ro 52. HOR. 1. maimultekost. — 3. lampion; skem. — 4. tola. — 5. garbej. — 6. navul. — 7. embusk. — 8. tortur. — 9. eman. — 10. citi; omnibus. — 11. kunlaboranto.

VERT. 1. malliberec. — 2. miaŭ. — 3. limig; boat. — 4. niel. — 5. uni; rast. — 6. kolomb. — 7. tenden. — 8. jaht; nur. — 9. kest. — 10. korv; ruben. — 11. makleristo.


N-ro 53: TROVU PROVERBOJN el la « Proverbaro Esperanta » de Zamenhof, ordigante la sekvantajn letergrupon:

- afe-far-kaj-loj-lsa-maj-oje-paro-roj-sma-sta.
- alup-kaj-lalu-nko-nte-onto-orak-pore-pril.
- aka-gul-kiu-lag-las-ono-pis-rdi-rom-son.
- alb-asm-ems-ing-kiu-m-lor-odo-one-ras.
- alĉ-aon-cit-ees-evā-ĉbu-lod-ona-plo-ras-son.

N-ro 54: KRUCVORTENIGMO.

HORIZONTALE. 2. en la loko de io meĉi ion aliaĵ. — 4. arbo (R) — dokumento per kiu oni certigas ion (R). — 5. metalo (R); tute senvalora (R). — 6. signo de venko (R). — 7. Esperanto-aŭtoro; antaŭnomo de tiu aŭtoro. — 8. paĝi interkonsentitan prezon por la uzado de io dum difinita tempo (R); patrineto (R). — 9. detruĵi ŝipon per eksplodigilo. — 10. ĝi ebligas transiron de rivero (R); infanetoj dormas en ĝi. — 11. regula arango (R); ŝvelaĵeto sur la haŭto (R); parenco (R).

VERTIKALE. 1. neplaĉa pro manko de komplezo aŭ de agrabiaj vortoj (R);



prepozicio. — 2. Konjunkcio; verkinto (R). — 3. legomo (R); moviganta akvo (R). — 4. malordigita (R); kiel barbo ekz. — 5. amuzejo en banlokoj (R). — 6. Sufikso (R); viroj uzas ĝin por sin vesti (R). — 7. armiloj servas por tio (R); ĝi estas trovebla sur nia marbordo (R). — 8. ĝi troviĝas en la okulo (R). — 9. la profesio de kuracisto, apotekisto, k.s., oni nomas tia; sufikso (R). — 10. Domkolorigisto uzas ĝin (R). — 11. Titolo de romano verkita de la aŭtoro sub horizontale 7; sufikso (R).

Sendu la solvojn al POSTBUS 342 (Enigmoj), BRUSSEL, antaŭ la 20.12. 1948.

DENKT ER OM:

15 DECEMBER



DAG VAN HET

ESPERANTO-BOEK!

Ferenc Szilagyi:




LA GRANDA AVENTURO

Originala novelo de la talenta Esperanto-verkisto Ferenc Szilagyi. La humoro de la rakontoj — entute 14 — estas varia: bonhumora, malgaja, satira aŭ tragedia. Samkiel la vivo.

La verko rikoltis plej varmajn laŭdojn de la recenzistoj. Eksteraje ĝi estas senriproĉa.

Broŝurita : fr. 84,50
Bindita : fr. 94,00



Folke Bernadotte:

LA FINO

El la Sveda: Stellan Engholm

La granda sukceslibro de nobla viro kiu oferis sian vivon por la paco. Pli streĉa ol romano: la lastaj tagoj de la tria regno. La subtitolo tekstas: « Miaj humanecaj intertraktoj en Germanujo printempe 1945 kaj iliaj politikaj sekvoj ».

Historia dokumento ilustrita per tutaĵaj portretoj de la ĉefrolantoj: Himmler, Kaitenbrunner, Schellenberg, Dönitz, k.m.a.

Broŝurita : fr. 36,00



VLAAMS ESPERANTO-INSTITUUT v. z. w.
PIETER VAN HUMBEEKSTRAAT 3, BRUSSEL-WEST
Postrekening : 3268.51

Bij gelegenheid van de *Day van het Esperanto-Boek* publiceren we hier een lijstje van uiterst interessante, mooi uitgegeven en bovendien goedkope Esperantowerken waarvan wij nog een beperkte voorraad bezitten, maar die bij de uitgevers geheel zijn uitgeput.

Aan de liefhebbers wordt hier wellicht een laatste kans geboden in het bezit te komen van een of ander begeerd boek, dat nu waarschijnlijk elders nergens meer in de handel nog verkrijgbaar is.

Indien een bestelling niet binnen de vier dagen is uitgevoerd, dan betekent dit: niet meer te leveren! Wij verzenden franco voor het binnenland. Betalingen achteraf en bij middel van onze postrekening.

- L. Sinha : Sivaĝi, sceno el Hinduja Historio, 68 p. fr. 8,50
Hindo rigardas Svedlandon. Abunde ilustrita, 200 p. fr. 60,00
- S. Bergman-Gerdman : Tra sovaĝa Kamĉatko. Abunde ilustrita, 276 p. fr. 58,50
- J. Scherer : Ĉirkaŭ la mondon kun la Verda Stelo. Ilustrita, 272 p. fr. 50,00
- E. Isaac-Morariu : Sonorilo kaj Kanono (Poemaro en Prozo) 60 p. fr. 10,00
- P. v. d. Broek : Oriento (Du rakontoj el Javo). Ilustrita, 168 p., bind. fr. 40,00
- E. M. Remarque-Kvar : En Okcidento Nenio Nova. 252 p., bindita fr. 97,00
- K. Sturmer : Por Recenzo! 62 p. kartonita : fr. 10,00; bindita fr. 16,00
- R. Haggard-Payson : Luno de Izrael (Rakonto pri la Eliro) 219 p., kartonita fr. 35,00
- Ph. Oppenheim-Wadham : Riĉa kaj sen Mono. 222 p., bindita fr. 50,00
- E. Ferber-Fabo : « Fanny » 240 paĝoj, bindita fr. 50,00
- Ch. Dickens-Zamenhof : La Batalo de l'Vivo. Ilustrita, 128 p. fr. 27,50
- I. Silone-Angelo : Fontamara. 190 p., bindita fr. 50,00
- A. de Jong-Kruit : La Perfido. 246 p., bele kartonita fr. 50,00
- I. Turgenjev-Kabe : La Lanternisto kaj aliaj prozaĵoj. 208 p., bele bind. fr. 50,00
- H. Sienckiewicz-Kabe : Patro kaj Filo. 216 p., bindita fr. 50,00
- M. Gold-Saville : Judoj sen Mono. 222 p., bele bindita fr. 50,00
- Emba : Mario kaj la Grupo. 172 paĝoj fr. 55,00
- H. Weinhengst : Turstrato 4. 174 p., broŝurita : fr. 55; bindita fr. 75,00
- L. Newell : Baksiŝ (Skizoj el la vivo de Egiptoj) 150 p., bindita fr. 85,00
- K. Kalocsay : Lingvo-Stilo-Formo (Studoj). 142 paĝoj fr. 30,00
Eterna Bukedo (Poemoj el 22 lingvoj) 352 paĝoj fr. 120,00
- L. Kokeny-Bleier : Enciklopedio de Esperanto. 2 vol. il. en tola bindo fr. 510,00



David Flood:

MI SERĈIS ORON...

El la Sveda: Karl Gustafson

Streĉa verko kiu rakontas pri la espero kaj trompiĝoj de malfeliĉaj elmigrintoj fine de la antaŭa jarcento.


Presita sur bela, senligna papero, tipografie senriproĉa kaj en plaĉa eksterajo la libro ĉiurilate estas tre valora akiraĵo. La traduko estas de Karl Gustafsson.

Broŝurita : fr. 78,00
Bindita : fr. 88,00

L. Baekelmans:

ELEKTITAJ NOVELOJ

El la Flandra: Jan van Schoor



Nau ĉarmaj noveloj de la populara flandra rakontisto Lode Baekelmans kiu tiel majstre pentris la mozaikan vivon en la havenurbo Antwerpen. La traduko estas de Jan van Schoor.

La malalta prezo kaj precipe la senriproĉa stilo kaj senartifika lingvo ebligas la sukcesan uzadon de tiu novelaro kiel legolibro por progresaj kursoj.

Broŝurita : fr. 12,00

DEVENO KAJ VIVO

(daŭrigo de p. 8)

En 1909 okazis pri tiu temo, en la « Internacia Scienca Revuo », enketo, kun jena elokventa rezulto: jarcenton preferas Bourlet, Christaller, Moch, Saussure, Rollet de l'Isle, Verax; centjaron preferas Bricard, Meazzini, Stromboli, Otto Simon, Uhlmann, Ledger, Jen bela ekzemplo de la malakordo, malkonkordo, pro la princip-manko!

La sama malkonkordo, senrezulta diskutado, okazis en ĉiuj dubaj punktoj: ujo & io, ata & ita, eksidi & sidiĝi, aliu & aliulo, ĉidomo & ĉi tiu domo, k.m.a. La eminentaj aŭtoroj de la « Plena Vortaro », en 1930, vidigis senintence la saman duoblecon, malkonkordon, nekonsistencecon; tio okazis pro la dispartigita laboro de 14 aŭtoroj:

- Fruktarboj: morusujo, persikujo, ĉerizujo, prunujo...
- Fruktarboj: merizarbo, persikarbo, kokosarbo, pomarbo...
- Religianoj: mahometano, kristano...
- Religianoj: budalsto, monoteisto...

En zoologio, la principmanko produktis gajan variaĵon: « Tetrao — el familio de galinacoj. Fazano — el familio de kokbirdoj. Perdriko — el familio de kokoj ». Tamen temas nur pri unu familio, kiu povus oportune havi la nomon de: kokoĉoj. La termino « karnivora » varias ankaŭ trioble en la « Plena Vortaro »: « linko karnomanganta. Strigo — viandomanganta. ŝarko — mangavida ». Ni tamen trankviligu, ĉar ĉio estas en ordo; ja la 14 aŭtoroj de la « Plena Vortaro » estis ĉiuj eminentaj: 3 Akademianoj kaj 11 Lingvo-Komitanoj.

(Daŭrigota)

DEVENO & VIVO

DE LA LINGVO ESPERANTO

originale verkis : Petro Stojan

bluaĵo	lazuro	ĉielbluo
amaji	amindumi	flirti
mastraji	mastrumi	(hejmestri)
profundegaĵo	abismo	(abiso)
kreskaĵo	vegetaĵo	vegetalo
malpuraĵo	ekskremento	feko
monarĥaĵo	monarĥio	monarkio
firmaĵo	kontinento	(firmitero)
supraĵo	ter-areo	surfaco
iniciatisto	iniciatoro	iniciinto
herezisto	herezulo	herezano
amisto	amindumanto	(Inemulo)
krozisto	krozŝipo	
vidilo	lorno	(teletubo)
surbordo	kajo	(bordejo)

La sufikso *-ec-* unue estis modere uzata de Zamenhof por kvalitoj. Poste, la nacia influo trooftigis ĝin senbezono: *beleco, boneco, longeco, rapideco*,... Depost Saussure (1910) la bonaj verkistoj ree uzas ĝin modere, kaj ne uzas kie la ideo ne kvalitas: *belo, bono, je longo de mil kilometroj, kun la rapido de kvardek kilometroj hore*, k.a.

La nedifina artikolo neeviteble funkcias, nur ĝia formo varias: unu, iu, ĝi. Mi rekomendas: *una*, por ne konfuzi kun la nombro: unu. La formo *una* harmonias, per la fina *a*, kun la difina artikolo LA.

SINTAKSO

En la komenco, kaj teorie, Esperanto estis dotita je plena libereco en la vort-arango, tiom kiom permesis la ĝenerala senco de frazoj. Oni povis egalrajte diri: *ridi je tio kaj ridi pri tio, li vidis nenion kaj li nenion vidis aŭ nenion li vidis*, k.a. Tiumaniere diversaj naciaj kutim-esprimoj povis tradukiĝi en Esperanto, donante la saman sencan. Tamen tiu amorfa stato ne povis senfine daŭri. En ĉiu formita lingvo estas fiksitaj ne nur apartaj vortoj, sed ankaŭ ilia ordo. Ĉiu ŝanĝo de ordo sekvigas ŝanĝon de senco, aŭ de senc-nuano. Tro nekutima ord-ŝanĝo ŝajnas stranga, erara aŭ nekomprenebla.

Unuaj bonaj verkintoj en Esperanto skribis, tradukante aŭ originale verkante, en ia meza stilo, kiun ili opinis «internacia». Zamenhof la unua, poste Grabowski, Gernet, Devjatnin, Kofman, k.a. Depost 1898-1905 De Beaufront kaj aliaj francaj samideanoj aldonas sian influon al tro slava stilo de Esperanto. Tiel formiĝas «klasika» sintakso, kiu regas preskaŭ absolute ĝis nun, se ni momente ne atentis la freŝan blonon de Orient-Eŭropaj verkantoj.

En tiu klasika stilo kristaliĝas kurantaj ofte bezonataj frazoj, parol-turnoj, formuloj de demando kaj respondo, de komenco kaj fino de leteroj. Teorie estas egale korektaj la du frazoj: *Mi petas vian pardonon kaj Pardonon vian petas mi*. Sed se la unua sonas normale en ordinara interparolo, la dua sonas tro maniere, kvazaŭ teatre aŭ poezie. Praktike, la unua frazo, dirita dum publika diskutado, povus kontentigi tiun al kiu ĝi adresiĝas. Sed la dua, en la samaj cirkonstancoj, sonus kiel moko, provoko aŭ ironio, sed tute ne kiel peto pri pardonon. La emocia koloro povas tute ŝanĝi la enhavon de frazo, kies teoria senco per si mem restas neŭtrala. Ĉi tie la nenormala vort-ordo efikas kiel efikus speciala tono de la voĉo, kiu povus doni saman mokan nuancon al la normala (unua) vort-ordo.

Ni presu alian ekzemplon. Nenormala stilo: *Mi vidis homon, kiu en la mezo de la urbo kuris sur siaj manoj, tenante la kruojn en aero, neniam*. Normala stilo: *«Mi neniam vidis homon, kiu en la mezo de la urbo kuris sur siaj manoj...»* Ĉiuj konsentos, ke la unua stilo kvankam gramatike korekta, estas absurda per sia vort-ordo, en kiu la esence grava «neniam» troviĝas je la fino. Sed, kiam frazoj estas nelongaj, ni ofte ne atentis pri la sama absurda vort-ordo, ni egale uzas: *«Li tamen mortigis neniam»*, kaj *«Li tamen neniam mortigis»*. Oni rimarkas, ĉe nunaj aŭtoroj, kiuj zorgas pri sia stilo, la pli-kaj-pli-oftan uzadon de tiaj neadoj tuj je la komenco de frazo, kiel en nia «normala stilo».

Ankoraŭ ekzemploj de ŝajne egal-valoraj frazoj, kies senco tamen diferencas: *«Mi ankaŭ petis vin alporti la libron.»* *«Mi ankaŭ vin petis alporti la libron.»* *«Mi petis vin alporti ankaŭ la libron.»* La dua frazo sencas ke mi petis plurajn personojn, interalie ankaŭ vin. La tria, ke mi petis vin alporti plurajn objektojn, ankaŭ la libron. *«Nur mi vidis fajron sur la monto.»* *«Mi nur vidis fajron sur la monto.»* *«Mi vidis nur fajron sur la monto.»* *«Mi vidis fajron nur sur la monto.»* Tia distingo estas neologismo, kiun ĝis nun ne sentas plimulto da Okcident- kaj Mez-eŭropaj esperantistoj.

Pro la klasikaj lernolibroj nia lingvo teorie posedas la liberecon de sintakso kaj niaj plimultaj gramatikistoj ne akceptos la ideojn de tiu ĉi skizo. Sed ili, la ideoj, ne estas persona elpensado de la aŭtoro, io kiel la «regulo de margerito» de Bolak, aŭ geometriaj skemoj pri la vortfarado. La sintaksa sistemo, kun fiksitaj (per uzado) vort-ordo, estas universala por ĉiuj vivantoj kaj mortintoj lingvoj, same kiel morfologia strukturo (ordo de elementoj, en kunmetitaj vortoj).

KUTIMO & LIBERO

Lingvo iomgrade similas al rivero. Rivero estas unuflanke: kuranta maso da akvo (de fontoj, pluvoj, lagoj) — aliflanke ĝi estas: kavigita en tero, la vojo kiun sekvas la akvo. Lingvo estas unuflanke: amaso da sonoj, ideoj, signoj, — aliflanke ĝi estas: materiaj kanaloj en la cerbo kaj spiritaĵoj en psiko, tra kiuj kuras la parolo. Nun, ni povas pli oportune kompreni, kial la formoj de lingvo sekvas prefere la samajn vojojn. Unua impresio lasas en cerbo materialan kaj en la psiko spiritan postsignon, kiel verŝita akvo lasas sulkon sur deklivo. Dufoje venanta impresio (samspeca) emas kuri tra la sama vojo jam gravurita. Tia estas la natura principo de la kutimo. Ĝia fizika sekvo estas en tio ke la postaj funkciadoj okazas pli facile, pli fluce, ol la unuaj. Ĝi estas la leĝo de minimuma fort-elspezo. Pli facilas indiki ĉiun membron de nia familio per ĉiam sama nomo (kutima nomo), ol ĉiutage ilin ŝanĝi. Okazas malofte, ke en urbo la sama strato portas (provizore) du malsamajn nomojn; sekvas el tio nekontenta kaj iom kolereta sento ĉe la loĝantoj. Kiam ŝviso, veninta al Francujo, diras *septante* (70) anstataŭ *soixante-dix*, li rimarkas ke, ĉe komprenita, li elvokas moketon, tiom forta estas la kutimo. Ni haltos sur du aliaj fortoj en la lingvo (modo, imito de novaĵoj, kaj emocio, renverso de kutimaĵoj), kiuj agas kontraŭ la kutimo, en apartaj esceptaj cirkonstancoj.

La komparo inter rivero kaj lingvo taŭgas nur por komenca kutimo. Kun la tempo, ilia funkciado tute

diferencas. Ju pli longe fluas rivero tra sia lito, des pli profundigaĵas aŭ firmigaĵas tiu lito, — la kutimo plifortigaĵas. Ju pli longe iu longvo praktikas siajn kutimajn formojn — ni parolas nun pri kultura urba medio — des pli ili senfortigaĵas, paliĝas, perdas sian esprim-povon. Tio estas sekvo de artefarita, altklasa literatura influo, kiu detruas la fundon de la lingvo, ĉiam serĉante novajn formojn, freŝajn nuancojn, renovigitajn esprimmanierojn, paralele kun ĉiam novaj vestoj, ĉiujare renovigataj modoj en kostumoj, aŭŝoj, ŝtofoj kaj aliaj tiom bagatelaj, kiom potencaj snobajoj. Esperanto ne estas lingvo de vilaganoj, sed eble ĝi ne fariĝos lingvo de snoboj, kaj espereble la detrua, forto de renoviganta modo ne tuŝos ĝin. Momente, ni supozu ke ĝi tendencas krei al si kutimajn formojn, kiujn ĝi ankoraŭ ne posedas. Ĉiu kultura urbana lingvo travivas tri fazojn: antaŭhistoria kaj antikva, kiam ĝi amorfe eliradis el kaoso; klasika periodo de kristaliĝo; dekadencia epoko de kaprica variado, detruado de klasikajoj. Por Esperanto devige ekzistas nur du tiaj periodoj: la amorfa kaj la estonta kristaliĝita; la tria eble venos, eble ne, ĝi ne povas nin interesi.

Emocia forto ŝanĝas ne la lingvon, sed nur momente ĝiajn formojn, kiuj — kiam la emocio forpasis — revenas al sia kutima stato. Unua esprim-maniere de emocioj estas mieno, gesto, spiro, tono de voĉo, — tion ni preterpasas, restante nun sur la bazo de skribita Esperanto. Dua esprim-maniere konsistas en vort-orda ŝanĝo, kiel ni jam ekzemplis. Stila metaforo, uzado de nekutimaj vort-kombinoj estas tria esprim-maniere, precipe kiel stila ornamo aŭ oratora figuro. Tial estas la variaĵoj: *Astro de la tago* (suno), *ĉefuro de Japanujo* (Tokio), *nia majstro* (Zamenhof), *la aŭtoro de Esperanto* (Zamenhof), *nia sankta libro* (La Fundamento), *la reĝo de la naturo* (homo), k.a. Estas nediskutebla la fakto ke nia lingvo ne havas fiksitajn sintaksojn kaj kristalitan frazeologion, parte pro tio ke ĝi ne maturiĝis, parte pro tio ke kelkaj influaj samideanoj persiste ripetas, ke Esperanto ne devas perdi sian sintaksan liberecon, sian riĉecon, kaj tiu influo iom haltigas la eblan maturigon de la lingvo. Nun ni vidu kiomgrade estas vera la aserto ke la libereco (en vort-farado kaj en fraz-farado) estas la fonto de riĉeco. Ekzemplon ni prenu el nia movado, kies terminoj estas delonge kaj ofte uzataj. Por organizitan grupon da esperantistoj, dissemitaj en multaj aŭ unu lando, ni uzas plurajn vortojn: *societo, asocio, federacio, unuigo, unio, ligo*. Laŭ niaj vortaroj tiuj vortoj havas malsamajn sencojn, sed neklare difinitajn. Ni lasu la vortarojn kaj observu la realan uzadon. Nia unua sento diras, ke «asocio» estas io pli vasta ol «societo». Sed esplorante la faktojn, ni miras trovante en la jarlibro ke «Franca Societo» enhavas 60 grupojn kun 1.600, dum la «Danziga Asocio» havas nur kelkajn anojn. Sed tiam la sento diras al ni, ke certe «federacio» estos tiu pli vasta organismo ol societo. Denove la vivo nin malblindigas: «Franclanda Universitata Federacio» kun areto da anoj estas malpli vasta ol «klubo» de iu ajn granda urbo. En Azio niaj samideanoj diras «instituto» kaj «kolegio» en senco de «societo, asocio, grupo».

Tiu ekzemplo montras amorfan, nefiksitan staton, kiu permesas nomi saman ajon per dek diversaj vortoj. Tio estas la riĉeco de formoj, de vortoj, sed ne de ideoj. En la momento kiam al ĉiu formo estos difinita ĝia senco, nur tiam nia riĉeco de ideoj estos ebla. Kaj nun, por sintakso, la sama stato konstatigaĵas. Estas kvazaŭ tablo kun dek tirkestoj, en kiuj estas po unu blanka folio. Certe, la tablo estas riĉa je tirkestoj, sed la sama blanka folio retroviĝas en ĉiu tirkesto, do la tablo estas malriĉa je paper-elekto. Sed, kiam en ĉiu tirkesto estos alia kolor-papero, en la unua — blanka, en la dua — ruĝa, ktp., tiam ni rajtas diri ke la tablo estas riĉa je kolor-paperoj. Strange estas, ke tiaj konsideroj restas ekster la kompreno por la adeptoj de la libera vort- kaj fraz-farado, kiun ili nomas fontoj de la riĉeco.

Jam estis proponita la distingo inter *-io* kaj *-ujo* — por pliriĉigi nian lingvon je ĝia esprim-povo. Laŭ tiu propono *-ujo* konservas sian fundamentan signifon: teritorio loĝata de... *Germanujo* do signifus ĉiujn landojn kun germana plimulto: de Graz ĝis Wien kaj ĝis Strasburg, tio kion germanoj nomas *Deutschum*. *Germanio* restus por nomi la oficialan regnon «Reich». Antaŭ la milito ekzistis *Polujo*, dividita inter tri regnoj: Rusio, Germanio, Aŭstrio. La postmilita (1919-1939) *Polio* estis regno kiu enhavis parton da Ukraino, parton da Rusujo k.a. Sed la nuna uzado jen ekskluzive «*uja*», jen ekskluzive «*ia*», kondukas al konfuzaĵ kaj absurdaĵ frazoj.

Radikoj naskas vortojn. Vortoj naskas frazojn. Sed inter vortoj izolaj kaj frazoj kompletaj estas multvortaj esprimoj, kiuj aparatenas samtempe al vortaro, al frazeologio kaj al sintakso. «Tio saltas en okulojn» diras franca kaj germano por diri: tio estas tre videbla. — «tio jetiĝas en okulojn» diras ruso, «tio falas en okulojn» diras serbo. Ĉiu sentas, ke nia lingvo povas havi similan bildesprimon. «Stulta kiel ansero» (franca), «stulta kiel ŝafo» (rusa), «stulta kiel azeno» (germana)... — eltiri ion por Esperanto el tiuj tri frazoj estas neeble, ĉar ansero simbolas inteligenton, azeno saĝecon por aliaj popoloj. Por havi bildan frazeologion, ni bezonas unue kompare studi naciajn frazeologiojn, studi per iu tuthoma metodo (se tio eblas) kaj nur poste krei la esperantan. Unu el grandaj taskoj por la estonto.

LINGVA KOMITATO

Antaŭ la Unua Kongreso en 1905, Zamenhof havis sian planon de «Tutmonda Ligo Esperantista», estrota de «Centra Komitato» (516 anoj), kiu zorgus pri la lingvo. Sed la francoj eminentuloj (De Beaufront, Boirac, Bourlet, Michaux, Sebert, Cart) preparis siajn planojn, kies realigo dependus de la kongresanaro. Tiu-tempe Ruslando estis en plena revolucio dum kiu la Esp.-problemoj forgesiĝis. Multaj bonaj esperantistoj ne povis veni al la Kongreso.

Kiam Zamenhof alvenis al Bulonjo kaj lin unufoje ekvidis la francaj eminentuloj, ilia unua impresio detruis ilian antaŭan imagitan aspekton de la «genia aŭtoro de Esperanto». Krom kelkaj orient-eŭropaj trajtoj, strangaj por la francoj, neatendite montrigis la malalta staturo, modesta mieno, mola parolo, preskaŭ timemo... Tuj la francaj eminentuloj eksentis ke iliaj

personaj planoj eble sukcesos, des pli ke ne venis slavaj samideanoj, poloj & rusoj, sufiĉe nombraj. Unua kunsido de la Kongreso elektis: prezidanto, Zamenhof; vicprezidantoj Boirac Sebert, Micheaux, Mybs, Pollen, t.e. tri francojn, unu germanon, unu anglon. El tiuj 5 eminentuloj nur unu iom sciis Esperanton — Boirac. Estis farita mallerta eraro: oni ne elektis la polan samideanon Kabe, kiu posedis Esperanton nekompareble pli profunde ol ĉiuj francaj eminentuloj, kune konsideritaj. Jam sufiĉis ke la Kongreso, en Francujo, altiris pli da francoj ol alinacianoj; sed krome — en la Kongresa estraro sidis tri francoj, sed eĉ ne unu slavo (pola aŭ ruso). Zamenhof okupis la postenon de honora prezidanto, kiu honorigas la kunvenojn, sed lasas agi la aliajn. Do, la franca plano sukcesis. La Zamenhofa plano fiaskis. Oni elektis grandiozan «Lingvan Komitato» kun 99 anoj (el 28 landoj), kiu devis premi sur sin la gravan rolon de la lingvo-zorganto. El tiu nombro (99) nur 20 kapablis kontentige paroli en Esperanto, kaj el tiuj 20 eble 3 aŭ 4 kapablis serioze gvidi la lingvon! Sed, dum la gajaj kongresaj tagoj, kun damoj, floroj, flagoj, muzikoj, promenoj, toaŝtoj... oni ne pensis ke Esperanto — lingvo jam perfekte preta — bezonas ian apartan studon aŭ flegadon...! Oni elektis la 99 diversnaciajn samideanojn, pli por honorigi ĉiun el la 28 nacioj, ol por devigi la nov-elektitojn al iu respondeca laboro! Ke mi ne troigas la malkapablecon de la 80 el 100 tiamaj eminentuloj & L.K.-anoj pravas la fakto ke en 1925, dum la Geneva Kongreso, la hispana Akademiano flame parolis dum la publika kunsido pri «...tutaj la homoj, kiuj...» Tiel estis en 1925. Sed en 1905, niaj tiamaj eminentuloj estis ankoraŭ malpli lertaj en la buŝa uzado de Esperanto. La 16-jara Privat, kiu flue parolis, en 1905, estis konsiderata kiel la «oka mirindaĵo» en la tutmondo! Oni do elektis la 98 anojn (pluz Zamenhof) el la diverskolora amaso da fervoraj propagandistoj, lokgrupaj prezidantoj, broŝur-eldonintoj, Esperanto-turistoj (el la speco de Pollen), elpensintoj de esperantistaj brust-steletoj, fabrikantoj de esperantistaj poŝtkartoj & silk-flagetoj, k.t.p. La tempo estis gaja... oni do gaje elektis kaj honorigadis!

Inter la 98 nove-bakitaj L.K.-anoj estis ankaŭ la «birdoj», kiuj ne sciis skribi eĉ tri liniojn en korekta Esperanta lingvo! En privataj dumkongresaj babiladoj, Kabe melankolie diradis: «la Komitato ne povos labori, se oni ne forigas el ĝi tri kvaronojn da anoj!» El la 215 anoj de la L.K., sinseve elektitaj de 1905 ĝis 1914, mortis 29, memvole aŭ disdiscipline ekŝiĝis 115 kaj restis 71 en 1927. Dum la patreca regado de Th. Cart, Warden, la L.K. ree kreskis: 122 anoj en 1932, poste 116 anoj en 1936. Tamen, multaj bonaj spertuloj ne estis invititaj en la L.K., nek en la Akademion... ekz. E. Wüster.

Car la elektitoj akiris la titolon de Lingvo-Komitatoj, la naiva Esperantista publiko opiniis ke ili estas kvazaŭ Esperanto-lingvistoj, specialistoj en kies manoj la lingvo Esperanto estos bone gardata & zorgata — se necesos, eĉ pli perfektigata. Mi havas kolekton da leteroj, skribitaj de pluraj L.K.-anoj, inter 1905 & 1930. Kelkaj leteroj, specipe pli fruaj, entenas oftajn gramatik-erarojn, parte kontraŭ la Fundamento, parte kontraŭ la kutima stilo, stabiligita post 1920.

La principo de la voĉdonado, kiu decidis la lingvo-problemsolvajn, kondukas al absurdo, ĉar tia voĉdonado ofte donas la venkon al multaj nekapabluloj, maldiligentaj & sentalentaj, kontraŭ 2-3 spertuloj, sole kompetentaj en tiu aŭ alia problemoj. Estas kvazaŭ soldatoj, kiuj voĉdone decidis kiel & kien kondukos ilin la kolonelo!

Sed, dum la patreca regado, la Akademio ne laciĝis sin... ĉar ĝia prezidanto ja deklaris ke «La Akademio ne rajtas erari...» Tamen, la erarebleco estas profunde doma kvalito, kiu montriĝas malgraŭ ĉiuj deklaroj & sankcioj! La Esperanta Akademio do preferis nenion fari ol «erari!» Jen, kial, post 30-jara senerrara funkciado, ni ankoraŭ ne havas la regulon pri la artikolo, pri la akuzativo, pri ata-ita, k.m.a.

SEN PRINCIPOJ

Ĉiu stabiligita lingvo, eĉ lingveto, eĉ popola, eĉ sovaĝa, nekultura dialekto, posedas sian spiriton, siajn principojn, posedas ilin senkonscie aŭ konscie, laŭ la nivelo.

Esperanto travivas amorfan fazon kun pluraj interluktaĵ tendencoj, sed sen unuanime adoptitaj principoj. Nek la Fundamento, nek la verkaro de Zamenhof, nek la «laboroj» de la Akademio kun L.K., nek iu alia institucio — formulis la principojn de Esperanto. El tio sekvas ke ĉiu ara (: kolektiva) lingva kunlaboro aŭ fiaskas, aŭ malfortigaĵas pro la malsamaj opinioj, pro la manko de unu principa bazo. La sinfina disputado pri la *miljaro-jarmilo* donas tipan ekzemplon de la sen-principa hezitado. Valoras halti & funde esplori la problemon, komencante je nombroj (en la franca, angla, itala, rusa):

onze	eleven	undici	odimacat
doize	twelve	dodici	dvenacat
treize	thirteen	tredici	trinacat
quatorze	fourteen	quattordici	ĉetyrnacat
quinze	fifteen	quindici	petnacat
seize	sixteen	sedici	ŝesnacat

Jen kiel formiĝas la nombro-nomoj por 11, 12, 13... en ĉiuj lingvoj de nia familio hind-eŭropa. Laŭ tiu unuforma modelo, la samaj nombroj en Esperanto devus esti: unujedek, dujedek, trijedek,...

Kaj poste:	centurie	century	secolo	stoletje
	millénaire	millenary	millenario	tuĉeletje

El tio logike sekvas por Esperanto: *centjaro* & *miljarumo*

Sed Zamenhof, por la serio 11, 12, 13... renversis la erojn: dekunu, dekdu... kaj por diri jarcento, jarmilo, — li mallerte ne uzis ian sufikson, sed konfuzige formis: centjaro = cent jaroj

miljaro = mil jaroj

Evidentas ke «centjaro» pli logike devus signifi: centa jaro, la jaro de centjara jubileo, k.s. Sed, se li uzus ian sufikseton, ĉio estus en bona ordo:

centjareo = 100 jaroj

miljareo = 1000 jaroj

La rusa lingvo uzis la sufikson *je*: sto-let-je (sto = 100, let = jar, je = ajo, umo, aro).

Sed ni jam adoptis la renverson en la 11, 12, 13... do, ni estu konsekvence logikaj & uzu: jarcento, jarmilo.

(Daŭrigo, fine de p. 7)

Verantw. uitgever: *Vicamse Esperantisten-Bond, Postbus 342, Brussel.* — Drukkery: *J. Van Laer, Kortegbeek, Begijnestraat 56-58, Turnhout*